

Matthias Jochumsson,
 Islanda nacia himno

tradukita de N. N. 61

Hejmlanda Di', hejmlanda Di',
 ni laŭdas la nomon, la sanktan de Vi!
 Girlandon kunplektas el sunaŭreol'
 la tempo, jen via legi'.
 Por vi estas tag' kiel jaroj mil,
 kiel tago mil jaroj, ne pli,
 floret' de eterno kun rosa trembril',
 kiu vivas kaj mortas en vi.
 Islandaj jaroj mil,
 Islandaj jaroj mil,
 floret' de eterno kun rosa trembril',
 kiu vivas kaj mortas en vi.

.....

Traduko de la islanda poemo "Lofsöngur" de Matthias Jochumsson en Esperanton de N. N. 61.

Arg-852-1730 (2013-03-18 10:54:29)

Esperantigo de la unua strofo de la islanda nacia himno. Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi Esperantigon en la libreto "Jen la kanto de vojaĝ", eldonita de "Dansk Esperanto-Forlag Aabyhøj", (tria represo 1973, ISBN 87 85020 230). La tradukinto estas ne indikita. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/islanda.htm>. Tie estas indikita alia Esperantigo de la himno verkita de Baldvin B. Skaftefjell.